

La Progresanto

Studieblad van de Bond van Arbeiders-esperantisten
in het gebied van de Nederlandse taal

lom pri neologismoj (I) F. Faulhaber

Ĉu la vortoj „kirko“ kaj „trajno“ estas necesaj?

La vorto *preĝejo* signifas „konstruo en kiu oni preĝas“ (P.V.). Do ankaŭ judaj kaj mahometanaj konstruoj, en kiuj oni preĝas, estas *preĝejoj*, kvankam oni prefere nomas ilin resp. *sinagogo* kaj *moskeo*.

En la lasta tempo aŭdiĝis propono enkonduki por kristanaj preĝejoj la vorton *kirko*. Tiu propono naskiĝis evidenta el sento pri simetrio. „Se judoj kaj mahometanoj posedas apartan vorton por tiu konstruo,” oni rezonas, „kial do ne ankaŭ kristanoj havu ĝin?”

Ĉu la vorto *kirko* estas tiom internacia kiom la vortoj *sinagogo* kaj *moskeo*, estas demando, kiun mi nun ne volas tuŝi. Pli grava demando estas: Ĉu aparta nomo por kristana preĝejo estas *necesa*? Mi opinias, ke ne. La uzado de la vortoj *sinagogo* kaj *moskeo* limigis la signifon de *preĝejo* al „konstruo en kiu preĝas kristanoj.” Ĉiu mem povas konstati tion: legante aŭ uzante la vorton *preĝejo*, pri kio ni pensas? Ordinare pri kristana, ne pri juda aŭ mahometana preĝloko. En la praktiko ĝi do estas konata preskaŭ nur en tiu senco. Kial do enkonduki la vorton *kirko*?

La evoluo donis al *preĝejo* duan signifon, kaj mi opinias, ke estas konsilinde registri ĝin en Plena Vortaro.

Kompreneble, la origina, la fundamenta, signifo de *preĝejo* restas valida. Oni rajtas diri: *Sabate la judoj iras al la preĝejo*, kaj eĉ la plej harfendema esperantisto ne legos el tiuj vortoj, ke la judoj iras al preĝejo kristana. Tamen mi kredas, ke ĉiu uzus en tiaj okazoj la vorton *sinagogo*.

El kia bezono naskiĝis la vorto *trajno*? Ĉu *vagonaro* ne sufiĉas? Ĉu *trajno* eble enhavas nuancon, kiun ne esprimas *vagonaro*? Plena Vortaro diras pri *trajno*: „1. Vagonaro movata de lokomotivo aŭ alia motora forto. 2. z. Veturilaro sekvanta armeon,” (pri tiu dua signifo ni nun ne parolos). Pri *vagonaro* ĝi diras: „Serio da vagonoj, ligitaj inter si kaj trenataj de lokomotivo aŭ alia motorveturilo.”

Laŭ tiuj klarigoj mi ne povas konstati ian diferencon inter *vagonaro* kaj *trajno*. Do kial ni bezonus *trajno*?

Ĉu eble pro tio, ke *trajno* estas pli „internacia”? Sed germanoj, ĉeĥoj k.a. tute ne profitas el tiu „internacieco.”

Neologismojn oni uzu en okazoj de vera bezono. Tiu bezono, miaopinie, ne montriĝas koncerne la vortojn *kirko* kaj *trajno*, kaj koncerne plurajn aliajn. . .

Pri la karaktero de Plena Vortaro mi ofte konstatis opinion malĝustan. Amiko skribis al mi, ke li jam longe sentis bezonon pri aparta vorto por *kristana preĝejo*, kaj ke li ĝojas esti trovinta ĝin en Plena Vortaro. Evidente pro tio li konsideras la vorton *kirko* oficiala, almenaŭ rekomendinda. Tia oni tamen ne rigardu ĝin. La tasko de vortaristo estas registri ĉiujn vortojn uzitajn en la

Novaj eldonajoj

Rudolf Rakuša: *Esperanto*. Lernolibro por slovenoj. 1a kaj 2a volumoj. Ljubljana 1956.

Se mi ne estus nederlandano kaj esperantisto, mi dezirus esti sloveno por lerni Esperanton per la lernolibro de Rudolf Rakuša! Per tiu libro la aŭtoro kondukas la lernanton ĝis la plej alta ŝtupo de scio pri nia lingvo. Ĝi baziĝas sur multe da sperto, estas tre detale ellaborita kaj traktas ne nur la teorion, sed ankaŭ la praktikon. Ĝi igas la lernanton ne nur traduki en kaj el Esperanto, sed ankaŭ skribi leteron kaj paroli. La stilo de la multaj interesaj legoekzercoj estas internacia. Ilustraĵoj agrabligas la legadon. Ni gratulas la slovenan esperantistaron pri ĉi tiu solida lernilo.

★

Alispeca estas la lernolibro de D-ro Ferenc Szilágyi: *Curso prático de Esperanto*, adaptita al la portugala lingvo de Ismael Gomes Braga. 3a eld. Niaj brazilaj amikoj malfermis la 15an de decembro 1956 propran presejon „Gráfica Esperanto”. Kiel memoraĵon pri tiu okazo ili eldonis ĉi tiun represon — la unuan presadon de la nova entrepreno — en 20.000 ekzempleroj.

La metodo de Szilágyi aperis jam en pluraj lingvoj — ankaŭ en la nederlanda. Ĝi klopodas per amuza maniero kaj multaj bildoj — en kiuj la konata Adamson ludas ĉefan rolon — popularigi nian lingvon ankaŭ inter

tiuj, kiuj ne kutimas studi laŭ lerneja maniero.

Ni deziras al la aŭtoro, la adaptinto kaj la eldonintoj grandan sukceson.

★

La eldonon de ambaŭ lernolibroj montras, ke la Esperanto-movado en Jugoslavio kaj Brazilio prosperas!

★

Ĉu oni iĝos pli kaj pli stultaj? Pri ĉi tiu temo aperis en *Norda Prismo* interesa artikolo de Alf Ahlberg, grava publicisto de la sveda gazetararo. La tralego de la 1a numero de la 3a jarokolekto instigas nin atentigi niajn legantojn denove pri la ekzisto de *Norda Prismo*, Kultura, Socia kaj Literatura Revuo dumonata, sub redakto de D-ro F. Szilágyi. En 64 paĝoj ĝia varia enhavo kontentigas eĉ la plej postuleman leganton. Adreso: Mariendalsgatan 9, Borås, Svedio.

★

Malpacience ni atendis nian ĉiujaran *Sennacieca Revuo* de SAT, sed fine ĝi aperis! De la unua ĝis la lasta paĝo ĝi okupas nian atenton. Ni trovas en ĝi i.a. pri Rabelais, Cervantes, Rembrandt; priskribojn de vojaĝo tra Grekio; faktoj pri soveta ekonomio; punlaboruloj en frua Aŭstralio; naciismo en historio de aviado; laŭ mia ... ridpunkto (Schwartz) kaj multon alian.

Mendu ĉe SAT, 67, Avenue Gambetta, Paris 20, aŭ ĉe via loka SAT-peranto.

Nia plej nova eldonaĵo:

G. P. DE BRUIN

**HISTORIA SKIZO
DE LA INTERNACILINGVA IDEO**

Unika verko, kiun ĉiu esperantisto devas posedi! - *Prezo f 1,50.*

Mendu tuj ĉe **LIBRO-SERVO FLE**
Admiralengracht 214, Amsterdam
Poŝtĝiro 111278.

Redactie en Administratie:

Admiralengracht 214
Amsterdam-West.

<i>Red.-comité</i>	Jac. Lem Jr.
<i>F. Faulhaber</i>	J. W. Minke
<i>W. F. Kruit</i>	J. Ph. Punt
<i>H. Kuyt</i>	J. v. Scheepen

f 3,50 per jaar; f 2,50 voor leden van FLE. Postgiro 111278

literaturo, por ke oni, renkontante nekonatan vorton, povu trovi ĝian signifon en sia vortaro. Pri Plena Vartaro tio ne signifas, ke la koncerna vorto estas oficiala aŭ rekomendinda. La uzantoj atentu, ĉu la vorto komenciĝas per grandlitero — kio signifas oficiala — aŭ per malgrandlitero — kio signifas neoficiala. Montriĝis tamen, ke tiu diferencigo inter „oficiala” kaj „neoficiala” al multaj ne estas sufiĉe klara. Ĉu estontece oni presigu la neoficialajn vortojn ruĝoj?

Ni parolu en Esperanto!

G. P. de Bruin.

TRIA LECIONO: PRI KONSTRUADO KAJ KONSTRUAĴOJ.

(Legu la enkondukon sur p. 25).

Demandoj:

1. Kio estas konstruaĵo?
2. Kion oni faras unue, se oni intencas konstrui ion?
3. Kio estas la dua ĉefa agado?
4. Ĉu oni konstruas sur la supraĵo de la tero?
5. Kion oni masonas en la sulkoj?
6. Kiujn materialojn oni uzas por konstrui ion?
7. Kiujn konstruaĵojn vi konas?
8. Ĉu ekzistas aliaj konstruaĵoj?
9. Kiu faras la desegnaĵon por konstruaĵo?
10. Kiu laboristoj partoprenas la konstruadon?
11. Kiu glatigas kaj blankigas la murojn?
12. Kiujn konstruaĵojn oni bezonas plej multe?
13. El kio konsistas la brikoj?
14. Kiel oni fabrikas la brikojn?
15. Ĉu argilo estas kreskaĵo?
16. Kiu liveras la lignon?
17. Ĉu oni uzas tutajn arbotrunkojn por konstrui domon?
18. Kiel oni faras tabulojn el arbo?
19. Ĉu la segitaj tabuloj estas glataj?
20. Kiel oni glatigas lignon?
21. Kiel nomiĝas la aparato, per kiu oni rabotas?
22. Kiujn ilojn uzas la ĉarpentisto i.a.?
23. Kio estas ofte la plej alta punkto de domo?
24. Kiu konstruaĵoj havas tre altajn kamentubojn?
25. Per kio oni farbas la pordojn, fenestrojn ktp.?
26. Por kio servas la farbado?
27. Ĉu ankaŭ muelilo estas konstruaĵo?
28. Ĉu konstrui ĉiam signifas „starigi masonaĵon aŭ ĉarpentaĵon“?
29. Kiu proverbo entenas la vorton „konstrui“?

Respondoj:

- Io, kion oni konstruis.
Desegnaĵon.
- Mezurdifini la lokon, kie oni konstruos.
Ne, oni fosas sulkon.
- La fundamentojn de la konstruaĵo.
Brikojn, betonon, feron, lignon, vitron ktp.
- Domojn, fabrikojn, lernejojn, butikojn.
- Jes, preĝejoj, muzeoj, fortikaĵoj, palaĉoj.
Arkitekto.
- Masonistoj, ĉarpentistoj, pentristoj k.a.
Stukistoj.
- Loĝejojn.
- El argilo.
Oni bakas ilin.
Ne, mineralo.
Arboj.
- Ne, trabojn, latojn kaj tabulojn.
Per segado.
Ne, ili estas krudaj, ne glataj.
Per rabotado.
Rabotilo aŭ rabotmaŝino.
- La martelon kaj tenaĵlon.
- Kamentubo.
- Fabrikoj.
- Per farbo.
- Por plibeligi la domon kaj por la konservado (ŝirmado) de la ligno.
Jes, ankaŭ....
- Ne, oni povas konstrui ankaŭ frazon, poemon, pacon.
Kiu ĉe la vojo konstruas, tiun ĉiu instruas.

Kaj nun la praktiko!

J. Ph. Punt, Kenaustraata 35, Utrecht.

OPGAVE 4. VERTAAL :

Als we 's morgens ontwaken, verheugen we ons, als de zon schijnt. 2. Dan schijnt het ons toe, dat alles niet alleen lichter, maar ook vrolijker is. 3. Maar niet altijd denken we er aan, dat alle leven op aarde zou ophouden, als we de warmte van de zon niet hadden. 4. De zon is een van de talloze sterren, die tesamen het Melkwegstelsel (galaksia sistemo) vormen. 5. De afstand tussen haar en de aarde is $149\frac{1}{2}$ miljoen kilometer. Haar licht heeft $81\frac{1}{9}$ minuut nodig om de aarde te bereiken. 7. Daarom zien wij de eerste zonnestralen dus iets meer dan 8 minuten, nadat de zon reeds is opgegaan. 8. De ster Proksima (wat een uitstekende naam) is de dichtstbijzijnde der andere sterren. 9. Hebt U enig idee, hoe lang het licht van deze ster moet reizen alvorens op aarde aan te komen? Het is niet nodig, dat U dat weet, maar daar U nieuwsgierig bent, zullen we U een klein sommetje laten maken. 11. Deel 10675 door 2500 en U krijgt het juiste antwoord, echter niet in minuten, maar in jaren. 12. Er waren mensen die dachten, dat de sterren gaatjes waren in het firmament (firmamento). 13. Natuurlijk vinden wij dit erg belachelijk. 14. Tegenwoordig zijn we veel wijzer, maar de wijste mensen zijn nog altijd diegenen, die zich verbazen over hun eigen onwetendheid.

FACILE LEGI ESPERANTON

Princo Niĉjo.

Vivis iam reĝino, kiu tre laciĝis pro la regado. Ŝi ekregis post kiam ŝia edzo, la mortinta reĝo, iun matenon irante al la barbiro, pasis trans la straton kaj trafis sub tramon. Tio okazis antaŭ longe. En la komenco ŝi treege ploris, sed poste ŝi eksidis sur la trono por regadi. Kaj hodiaŭ ŝi estis laca; lacega.

Feliĉe ŝi havis sep filojn kaj unu el ili do fariĝu reĝo, ŝi pensis. Ili ĉiuj estis sufiĉe aĝaj. Sed kiun ŝi elektu? De la unua ĝis la lasta ili estis bonkondataj kaj agrablaj al la homoj. Kiel reĝon ŝi tamen prefere vidus la plej junan princon, Niĉjo, pro tio, ke li ĉiam gajigis ŝin kaj povis bele flutludi. Sed ĉu estus dece elekti la plej junan?

Ŝi vokis sian ĉef-ministron kaj demandis al tiu maljuna kaj saĝa homo, kiel ŝi elektu postsekvanton. La ministro karesis sian barbon kaj diris: „Konkurso, Sinjorino, ĉu tio estus konvena?”

„Jes”, diris vigle la reĝino, „bona ideo. Sed kia konkurso? Ne estas necese, ke reĝo kuru; estus eĉ maldece se li farus tion”.

„Vi povus prezenti al la princoj tre malfacilan demandon. Kiu donos la plej prudentan respondon, fariĝos reĝo”, diris la saĝa ministro. „Tio ŝajnas al mi bona”, diris la reĝino. Poste kunsidis ankaŭ la aliaj saĝuloj en la palaco por eltrovi malfacilan demandon. La jenan ili trovis tre bela: „Kiu estas la plej utila besto?” La reĝino diris: „Hm, mi trovas ĝin iom instruista, sed mi scias nenian pli bonan. Mi do akceptu”.

(Daŭrigota)

UITWERKING VAN OPGAVE 3:

1. Aŭstralio kuŝas (situacias, situas) sur la suda duono (duonsfero, hemisfero) de la mondo (tero). 2. Ĝi estas preskaŭ tro granda, ol ke oni nomu ĝin (por esti nomata) insulo, sed tamen ĝi estas tute (plene) ĉirkaŭita de akvo. 3. Kvankam Aŭstralio estas granda lando, ĝi havas nur iom pli da loĝantoj ol Londono. 4. Tiu ĉi mondparto estis malkovrata en la dek-sepa jarcento (fare) de holandaj maristoj. 5. Jam ĉi tiuj miris pro la multaj strangaj (kuriozaj) bestoj. 6. La unuaj blankaj (blankhaŭtaj) loĝantoj estis punitoj el anglaj malliberejoj, kiujn sendis la registaro tien. 7. Poste (En postaj tempoj) venis centmiloj da aliaj. 8. En tiu tempo (Tiu tempo) la vojaĝo daŭris multajn monatojn. 9. La plej granda riĉ(a)ĵo de Aŭstralio fariĝis ĝia lano. 10. Por transporti ĝin (ĉi tiun) al Anglio plej eble rapide, oni konstruigis (igis konstrui) la rapidajn „clippers”, kiuj veturis en sesdek ok tagoj de Sidnejo al Londono. 11. Hodiaŭ por multaj Aŭstralio estas la lando de la (l') estonteco. 12. Ĉiumonate multaj el niaj samlandanoj kun (siaj) edzinoj kaj infanoj elmigras al tiu malproksima, ankoraŭ tiel (tiom) malplena lando. 13. Inter ili troviĝas homoj el ĉiaj profesioj kaj religioj (homoj ĉiaprofesiaj kaj -religiaj). 14. Estas tre (ege) necese, ke an-

OPGAVE 5.

De nikkers in Uganda „genezen” maagziekten op zeer originele wijze. De lijder wordt op de grond gelegd, vier stamgenoten houden hem vast en de genezer danst een walsje op zijn buik. Aangezien dat niet tot de aller-aangenaamste gewaarwordingen schijnt te behoren, schreeuwt de aldus behandelde geweldig. Daarop weet men raad: het stamhoofd met enige mannen staan erbij; zij slaan op hun tambourijnen en schreeuwen nog veel harder. Ik heb van deze vertoning een fraaie afbeelding in mijn bezit en iedere keer als ik deze op een lezing aan het aandachtig gehoor laat zien, barst de ganse vergadering in lachen uit. Nou ja, 't is me dan ook wat moois; wij weten toch ook wel beter, niet waar, we weten wel dat men op deze wijze geen maagziekte geneest. 't Geldt hier ook slechts onbeschaafde nikkers uit Uganda. Maar wanneer ik dan direkt daarop *Sequah**) op 't doek tover en ik daarna laat zien het schutblad van de mars, die hij spelen liet, terwijl hij de nikkers van Nederland — o, ik bedoel de beschaafde Nederlanders — „behandelde” dan wordt 't stil en gaat men nadenken, want ja, door deze sinjeur heeft menigeen zich destijds laten nemen. Zeker, we weten nu wel dat 't niets was, dat hij geen blijvende resultaten kon bereiken, dat hij veel kwaad heeft gedaan, 't geen niet verhindert, dat iemand zijn komst behoeft aan te kondigen, om 't volk in grote drommen tot zich te trekken.

(Kwakzalverij, E. Abrahams).

*) Bekend kwakzalver uit het einde der vorige eeuw.

Daŭrigo de paĝo 44

taŭe ili lernu iom el la angla lingvo. 15. Ekzistis (Estis) homoj, kiu(j) pensis, ke tie ili en mallonga tempo (periodo) povos riĉiĝi (riĉiĝos), sed pri tio (tiurilate) oni nuntempe (hodiaŭ) estas pli bone instruita (informita)¹). 16. Nur tiu (la homo) kiu pretas (estas preta) tre streĉe labori (laboregi), havas ŝancon sukcesi tie.

1) Een woordelijke vertaling van de Nederlandse tekst lijkt ons internationaal niet voldoende duidelijk.

VERTALING VAN OPGAVE 3.

1. Ludu (muziku) ĉiam tiel, kvazaŭ majstro 1) vin aŭskultas 2). — 2. Vera (reala) vivo estas pli bel(eg)a ol revata³) vivo. — 3. La ruzulo malestimas (malŝatas) la studadon, la simplulo admiras ĝin, la saĝulo ĝin aplikas⁴). — 4. Unu el 5) la plej disvastigitaj narkotikoj estas... la ĉiutaga deĵoro (laboro). — 5. Eviti la vivon pro la neeviteblaj vivdangeroj, estas la plej danĝera ago, kiun homo povas fari. — 6. Estu io kaj de via esto (personeco) elradios bona edukado. — 7. Kiu ne posedas lingvon, ne valoras nomon; kie ne vivas lingvo, ne ekzistas nacio (popolo). — 8. La plej grava eraro estas ne konscii pri eraro. — 9. Tio ja estas la plej granda miraklo, ke homo estas kia (kvazaŭ) la maro; neniam satigebla, tamen ankaŭ neniam elĉerpebla. — 10. Ekzistas⁶) neniu homo, kiu ne deziras (posedi) la liberon — sed la justulo postulas ĝin por ĉiu ajn, la maljustulo por si (mem). — 11. Kia la homo estas interne, tia estas lia⁷) juĝo pri la eksteraj aferoj. — 12. La nerezistemulo⁸) evitas la malfacilojn, la energiulo akceptas ilin kompreneble. — 13. Kiu ne ordonas sin mem, ĉiam restos subulo (servanto). — 14. Riĉ(eco) elĉerpiĝas pro la konsumado (uzado); kler(eco) plivastiĝas⁹) pro la uzado (ĝi, tio). — 15. Tiel kresku (progresu) en viaj idealoj, ke la vivo ne povos forkapti ilin de vi.

1) Niet: *mastro*, *instruisto*. 2) Men gebruikt hier ook veel de *us*-vorm. 3) Niet; *songata*. 4) Beter dan: *uzas*. Ook: *utiligas*. 5) Niet: *de*. 6) Zonder *ekzistas* is de vertaling op het eerste gezicht niet duidelijk. Ook: Ne *ekzistas* homo, kiu enz. 7) Niet *sia*, omdat *lia* juĝo een deel van het gezegde is. 8) Ook: *nerezistema*, *senenergia*, *malforta*. 9) Ook: *pligrandiĝas*.

Daŭrigo de paĝo 46

angulo sidis patrino, mamnutranta (kiu mamnut ris) sian infanon. Ĉio estis bildo pri mizero. 18. La hipokrita agadmaniero de tiu viro naŭzis min.

Korekto :

Bonvolu korekti sur p. 32, l. 3 de mal-supre: malakurata d.e. malordema.

Kiel ni diru tion ?

Jac. Lem, Valentijnkade 2, Amsterdam (O.)

Venki
Ostoj
Flesoj
Arkitekto
Super
Malsukcesa
Kontraŭ (por) kontanta pago
Malakra
Terkulturado
Fidi
Supre de
Ekburgoni
Senceremonie, abrupte
Kaduka, ruina
Konstruado
Ili estas nesupereblaj
Esti sensukcesa
Interkonsenti

OPGAVE 5.

1. *Botten* behoren tot de platvissen (pleŭronektoj), zij leven op de bodem der zee. 2. In het museum van de diereentuin zagen wij enige *botten* van de reuzenluiaard (negaterio), een voorwereldlijk (prahistoria) dier van reusachtige afmeting. 3. Door het prachtige voorjaarsweer *begonnen* alle planten reeds vroeg te *botten*. 4. Hoe hij ook zijn mededinger (rivalo, konkurranto) probeerde te overtroeven (superruzi), telkens *ving* hij *bot*. 5. Met zulke huichelaars wil (deziri) ik niets van doen hebben (rilati). Ik heb dan ook (tial) *botweg* geweigerd aan zijn verzoek te voldoen. 6. Beste kerel, met zulk *bot* gereedschap kun je toch niet werken. 7. Ik wil u dat toestel wel leveren (wel willen = konsenti) tegen die prijs, maar dan *boter bij de vis*. 8. Ik heb hem al zo vaak geholpen. Men kan doen wat men wil, het is alles *boter aan de galg gesmeerd*. 9. Ik heb er zo'n idee van (iel opinii), dat het tussen die twee niet erg *botert*. 10. Door gebrek aan materiaal werd het *bouwen* van die huizen enigszins vertraagd. 11. *Landbouw* en veeteelt (brutbredado) zijn voor dat volk de voornaamste bronnen van bestaan (vivrimedoj). 12. Hij heeft bewezen een vriend te zijn, op wie men kan *bouwen*. 13. De Amsterdamse beurs is gebouwd door Berlage, een beroemd *bouwmeester* uit het begin dezer eeuw. 14. Het is onbegrijpelijk hoe zoveel mensen in dat *bouvallige* huis konden leven. 15. Het was vannacht koud, de thermometer wees slechts

twee graden *boven* nul (la nulo). 16. *Boven* ons woont een gezin, bestaande uit man, vrouw en drie kinderen. 17. Wij hebben pech gehad (malbonŝanci), dat is waar, maar met enige moeite en goede wil zullen wij alles wel te *boven* komen. 18. Al onze artikelen zijn van de beste kwaliteit. Neemt proef! *Er gaat niets boven*.

VERTALING VAN OPGAVE 4.

1. Ĉu mi diris tion? Pardonu min, tiam mi sendube (certe) eraris. 2. Nun vi lamentadas. Sed kiel vi traktis aliajn? Vi pripensu: Por ĉiu ago venas la tempo de pago (Ricevos vulpo pro sia kulpo). 3. Ĉu vi razante vundis vin? Estas sango sur via kolumo. 4. Ni pasigis ĝuplenan ferion ĉe la bordoj de tiu rava lago. 5. Kiam ni suriris la oceanŝipon, kiu estis transportonta nin al la malproksima (fora), nekonata lando, ni ne povis ne ankoraŭ unufoje ĵeti rigardon sur la lokon, kie ni tiom dumvivis (travivis). (Surirante la oceanŝipon, transportontan nin, ktp.). 6. „Ne parolu al mi, mi petas, pri Esperanto, tiu lingvo estas neuzebla, oni kelkfoje aŭdas el la buŝo de t.n. saĝaj homoj (saĝuloj), kiuj konas eĉ ne unu Esperanto-vorton. — Por paroli pri malsaĝeco! 7. Mi borderos ĉi tiun ĉifonrandan tapiŝeton (tuketon). Ĝi ĝenas min. 8. La tepoto estas plena (ĝisranda plena), atentu, se ne, vi disverŝos. 9. Teleroj, pladoj, tranĉiloj, forkoj, kuleroj, ktp. estas manĝilaro. 10. Por pli bone komprenigi tion, kion li estis pritraktanta, la kursgvidanto skribis kelkajn ekzemplojn sur la nigra tabulo. 11. En la vestiblo pendis anonctabulo, sur kiu estis afiŝitaj (gluitaj) kelke da sciigoj (komunikoj, informoj). 12. Antaŭe vi estis ordonanto, sed nun la aferoj alie aspektas (la roloj estas inversitaj). 13. Gluu tiun fotografajon sur pecon da kartono, se ne, ĝi ĉiĝos. 14. Li estas honestulo (honesto homo). Vi ne timu prunti (pruntedoni) al li la petitaĵon. Mi garantias, ke li ĉiom ĝustatempe repagos. 15. Oni postulis de ni ne nur la subskribon de la kontrakto, sed ankaŭ kaŭcion da kvincent guldenoj. 16. Vekriante la viro terenfalas. Kuglo trafis lian bruston. 17. La rifuĝintaro malĝojige impresis. Multe da ili apatie sidis sur siaj malluksaj pakaĵoj; en *Daŭrigo sur paĝo 45*

Ekskursoj tra la vortaro *J. Šupichová, Praha.*

Iom da instruo en la grupvespero

(*Daŭrigo*):

20. Bacilo, bakterio, mikrobo, viruso.
21. Balanci, luli, swingi, ŝanceli. 22. Balkono, belvedero, teraso, verando.
23. Banala, triviala, vulgara, maldelikata, proza. 24. Bati, frapi, plagi. 25.

Bedaŭri, malĝoji, damaĝi, funebri, penti. 26. Boli, ardi, fulmi, flami, eksplodi (por nederlandanoj ni aldonas: kuiri). 27. Bordo, rando, sojlo, strando, plaĝo. 28. Branĉo, vergo, brako, forko, filio. 29. Budo, barako, kabano. 30. Busto, brusto, torso, talio, sino.

(*Daŭrigota*)

Opinioj el la legantaro pri „Internacia naciismo”¹⁾

K-do F. Baronnet skribas:

La uzo de la duapersona VI anstataŭ la triapersona ONI ne estas propra nederlandismo, ĉar ĝi apartenas ankaŭ al la franca. Mi ankaŭ ne konsideras ĝin kiel idiotismon eĉ kun la klafliko „internacia”, sed simple kiel stilan figuron. Tial mi ne opinias, ke ĝi estas forjetinda el Esperanto. Stilaj figuroj povas ŝoki la logikon, sed ili estas necesaj se oni ne volas mallevi la lingvon al simpla matematikaĵo. Oni relegu la paĝon, kiun skribis Lanti en siaj Leteroj pri „Idemo”.

Sajnas al mi ke la uzo de VI anstataŭ

ONI malpezigas la stilon kaj malneprigas la uzon de la terura ONIA (aŭ de la Lantia monstraĵo ONIES), kiun Zamenhof neniam uzis, kvankam li rekonis ĝian logikecon. Plie tiu interesa figuro igas pli intima la kontakto inter la skribinto kaj la leganto aŭ inter la parolanto kaj la aŭskultanto. Ni ne konfuzu la necesan logikon de la gramatiko kun la postuloj de la stilo, kies rimedoj dependas ne de la rigida matematika logiko, sed de tute aliaj faktoroj.

1) Vidu n-ron 1, p. 7.

Lingvaj lumetoj *F. R. Banham, Melbourne.*

1. *Sia*. En „Fabeloj de Andersen” I p. 63, l. 10 de malsupre kaj en „Fundamenta Krestomatio” (nova eldono) p. 51, l. 6 de supre ni legas: „ŝi rimarkis... la reĝon kun sia krono sur la kapo.” Prof-o Downes en la lasta verko piednote ŝanĝis *sia* je *lia*. Ossaka en *sia* „Personaj pronomoj” tamen defendas *sia* per: „... la reĝon havantan (aŭ: kiu havas) sian kronon sur la kapo.”

2. *Pantalonoj?* En „Levidoj” 6 : 10 ni legas: „... siajn linajn pantalonojn li surmetu sur sian korpon,” kaj en 16 : 4: „... linaj pantalonoj estu sur lia korpo.” La Majstro eble erare uzis ĝin plurale laŭ la slava maniero. Wingen rimarkigis pri la germana pluralo *Hosen*. Oni povus konkludi, ke la pastro surhavis *du* pantalonojn. Niaj hebrelingvaj amikoj bonvolu informi nin.

3. *Krom* estas slavdevena, kaj P.V. prave indikas, ke ĝi estas dusignifa. Tial oni uzu anstataŭ ĝi „escepte de” se temas pri „krom” laŭ difino 1 en P.V.

4. *La tagon estaŝ*. Strangan frazon ni trovis en „Levidoj” 23 : 3 kaj en „Eliro” 31 : 15: „... sed la sepan tagon estas sabato de ripozo.” Komparu: „Levidoj” 25 : 4: „... sed en la sepa jaro estu sabato de ripozo.”

5. *Tranŝo*. Oni povas diri pri regiono situanta tranŝe, ke ĝi estas *tranŝo*, simile kiel por „supre” = supro. „Tranŝo” ofte sufiĉas anstataŭ *tranŝejo*, *tranŝaĵo*, *tranŝeco*, laŭ la regulo pri neceso kaj sufiĉo.

6. *Strangajn kunmetaĵojn* ni trovas en „Iliado” de Kofman: *ponardegojnjetistoj*, *malproksimenpafantoj*; en „Rabistoj” de Zamenhof: *librojrimenoj*; en „Sinjoro Tadeo” de Grabowski: *kornoj-sonon*, *hundoj-bojo*.

Notoj pri Historio ka Movado

J. Šupichová, Praha.

KIO APERIS EN 1956? (Daŭrigo)

Turismo. (Daŭrigo)

— *Termoj de Montecatini*. Montecatini. Ilustrita prospekto en Esperanto. — *Nederlando: La fluganta Holandano*. Reĝa Nederlanda Aerkompano. — *Norvegio: Aŭto - Pramŝipo - Danujo - Norvegujo*. - Oslo. 4 p. — *Bonvenon al Oslo*. 6 p. — *Svedio: Borås*. Ilustrita broŝuro en lingvoj angla, franca, germana kaj Esperanta. — *Svisio: Bona konsilo de la plej bonaj turist-agentoj - eldonis Swissair*. 6 p. — *I.K.E.M. - Interŝtata Komitato pri Eŭropa Migrado - Genève*. — *Münchenwiller apud Murten-Morat*. 4 p. - *Swissair - eldonis 6-paĝan ilustritan prospekton*

pri flugo al kaj de Universala Kongreso en Kopenhago.

Movado.

SAT: *Esperanto-SAT Kalendaro 1956*. — UEA: *Jarlibro de UEA 1956*, I-a parto. 319 p. — UEA: *Jarlibro de UEA 1956*, II-a parto. 95 p. — *Kongreslibro de Internacia Fervoja Esperanto-Kongreso en Stockholm, 1956*. 16 p. — *La Internacia Lingvo - facila, simpla, bela, neŭtrala*. - Informa folio en lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala, sveda. Eldonis UEA. — Mařík J.: *Resuma historio de la Esperanto-movado*, 37 p. multobligita.

Interesa komparo

Lorelej'

de H. Heine

Lorelej

tradukita de D-ro L. L. Zamenhof.

tradukita de L. Elb.

Ne scias mi, kial subita
Malgaj' en la koro naskiĝis;
El tempo jam enterigita
Legendo al mi reviviĝis.
Jam malvarmetiĝas l' aero,
La Rejno mallaŭte babilas,
Per oro de l' sun' en vespero
La supro de l' monto rebrilas.
Plej belan knabinon mi vidas:
En ora ornamo brilante,
Sur supro de l' monto ŝi sidas,
La harojn mistere kombante.
La oran kombilon ŝi movas
Kaj kantas tra l' pura aero,
Kaj forto mirinda sin trovas
En tiu ĉi kant' de l' vespero.
Ŝipet' iras sur la rivero,
Ŝipisto ekstremis de l' kanto,
Kaj blinda por ĉiu dangero
Rigardas li al la kantanto.
Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
Perdiĝis sub l' akvoturnado;
Ĝin Lorelej' faris kruela
Per sia mirinda kantado.

(El: *Fundamenta Krestomatio*)

Ne scias mi, kial mi estas
Malgaja en la kor'.
Antikva fabelo restas
Por ĉiam en mia memor'.
Vespero jam malheliĝas,
Fluadas la Rejn' en trankvil',
La supro de l' monto lumiĝas
En vespersuna bril'.
Belega knabino jen tronas
Kun ora juvelar',
La belan vizaĝon kronas
Mirinde la ora harar'.
Ŝi uzas kombilon el oro
Kaj dume kantas ŝi.
Mirige tuŝas al koro
Sorĉiĝa la melodi'.
Kaj sopiregon eksentas
Ŝipisto dum sia vetur',
Rifaron li ne priatentas,
Al monto rigardas li nur.
Mi kredas, ke dronos finfine
Ŝipisto kun sia boat',
Kaj tion kaŭzos feine
La Loreleja kantad'.

(El: *Boletín, Hispanio*)

